


DIA REGNO

ISSN 0167-9554

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 1 (922) • 2017 •



Bibliaj Tagoj 2017 en Wittenberg

Merkata placo
Partoprenantoj
Studado
Fotis Václav POSPIŠIL



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +(0)420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu preferi pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec₉

ENHAVO

Por la unueco de la homaro	3
La ekumena semajno de preĝo	8
Fronte al pistolo de registara mortiganto	9
Protestantismoj	12
Prediko dum Bibliaj tagoj	16
Dum ne estas malfrue ...	19
Biblio sur via ... poŝtelefono ...	20
Partoprenlisto – kongreso 2017	22
Informetoj	23
Veninta estas nun la fin'	24

Redaktoraĵ vortoj

Post la vintro venas la printempo. Kaj la printempo kunportas varmon, lumon kaj esperon. Almenaŭ rilate al la naturo. Sed en la socio kaj pro la politikaj situacioj nacie kaj internacie mi ne same havas esperon aŭskultinte la ĉiutagajn novaĵojn. Eble nia tempoperspektivo estas mallonga – kiam regis longedaŭra paco kaj trankvileco? Certe ne dum la reformacia(j) epoko(j). Ankaŭ ne poste. Pli-malpli regule okazis persekutoj aŭ militoj dum la jarcentoj.

La prelego, kiun mi trovis en malnova DR, multe pensigis min – ĉu nenio okazis dum 50 jaroj? Aliaj artikoloj en la nuna gazeto montras diversspecajn malfacilaĵojn, dum diversaj epokoj, kiujn kredantoj renkontis. Sed la artikoloj ankaŭ montras ke homoj, firmaj en siaj kredoj, sukcesis multon fari aŭ al proksimumoj aŭ mondscale.

Finfine mi esperas – krom la espero ke vi trovos la gazeton plena da interesa kaj valora legado – ke vi ne forgesos aliĝi al nia somera kongreso en Zöblitz.

Por la unueco de la homaro

Tria prelego: Nia vojo kaj niaj kunvojaĝantoj

Èva FARKAS-TÁ TAR, HU

Dum la KELI-kongreso en Debrecen en 1966, sub la titolo “Por la unueco de la homaro”, prelegis Adolf Burkhardt, Èva Farkas, kaj profesoro R. Horsky. Ĉi-loke ni republikigas la artikolon de Èva Farkas. Ĝi unuan fojon estis publikigita en la januara numero de Dia Regno en 1967.

Ni ĉi-jare festos la 500-jaran datrevenon de la komenco de la reformacio kaj ni spertas la reagojn kontraŭ enmigrantoj/rifuĝantoj, la artikolo pri niaj kunvojaĝantoj estas daŭre ege aktuala. /red

Ni aŭdis jam du prelegojn en la kadro de ĉi tiu resuma titolo ”Por la unueco de la homaro”.

La teknika revolucio kun egaj paŝoj alproksimigis nian epokon, ke ĝi estu en siaj *eblecoj* la epoko de la univertsaleco.

“la fundamento, sur kiu kristanoj kun nekristanoj en la tuta mondo povas kunlabori, ne povas esti io alia – nur la amo”.

Sed la moderna tekniko, apud siaj benoj samtempe havas multajn minacajn danĝerojn kaj tiuj minacoj precipe devigas la homaron serĉi la vojon de la paca konekzistado.

Tiel ni atingis la trian prelegon, kies titolo estas “Nia vojo kaj niaj kunvojaĝantoj”.

En nia mondo precipe grava estas la demando; ĉu la kristanoj – aŭ kiel kristanaj eklezioj, aŭ kiel unuopaj anoj – estas la kaŭzantoj de la streĉoj en ĉi tiu mondo, aŭ ĉu ili agadas por la unueco? Ĉu ili prezentas dividajn fortojn aŭ kunligajn, integrigajn fortojn? Kian influon havas la kristanoj en nia hodiaŭa mondo?

La vojo

Ni devas do unue tre klare formuli kio estas *nia vojo*, ĉar tiam ni povas konstati kun kiuj ni povas kuniri sur ĉi tiu vojo. Apostolo Paŭlo en la unua epistolo al la Korintanoj je la fino de la dekdua ĉapitro skribas: “*kaj ankoraŭ pli preferindan vojon mi montras al vi*”; kaj poste komencas la admirindan himnon pri *la amo*. Jes, la fundamento, sur kiu kristanoj kun nekristanoj en la tuta mondo povas kunlabori, ne povas esti io alia – nur la amo.

Kie ĉi tiu vera amo, laŭ la maniero

de Jesuo Kristo aperas, ne povas okazi iu izolado, diskriminado, minimume ne de la flanko de kristanoj. Eĉ, se ĉi tiuj efikoj venus de la flanko de nekristanoj, la kristanoj ne rajtas respondi tiujn simile. Nek iu kristana fiereco, nek iu komplekso de malsupereco povas evolui tie, kie ĉi tiu amo de Kristo estas viva!

Ĉi tiu amo ne estas iu kristana virto, sed vera kunligilo, kiu efike kunligas la kristanojn unu kun la alia *en Kristo* kaj kun la nekristanoj, kun ĉiuj homfratoj *por Kristo*. Ĝi estas praktika solidareco ankaŭ kun nekristanoj. Memkompreneble ni scias, ke en ĝia tuta spirita profundeco, “amo” signifas pli, ol “solidareco”, sed ĉi tiu vorto jam aludas al la etika konsekvenco efektivigenda inter ni kaj la nekristanoj en nia ĉiutaga vivo.

Kaj la Vorto de Dio, kaj la Sankta Spirito ĉiam pli profunde instruas al ni ĉi tiun solidarecon, kiu signifas, ke la kristanoj ne vivas *super* la aliaj homoj, ankaŭ ne sub ili, sed *inter* la aliaj en solidareco pri iliaj zorgoj kaj ĝojoj, agadoj kaj penoj, vivo kaj morto.

Ni devas konfesi kun pento, ke la nekristanoj je multaj okazoj antaŭas nin sur la terenoj de bonfarado, malegoistaj agoj, helpo por la tuta homaro. Do, la parabolo de Jesuo Kristo pri la kompatema Samariano ofte ripetiĝas ankaŭ en nia vivo. Sed la ordono de la Sinjoro estas la sama ankaŭ hodiaŭ: “*Iru vi, kaj faru tion saman.*” (Luk:10,37).

Ne estas troigo, ke ni parolas pri pento kaj humileco, kiam temas pri la fruktoj de la amo de la kristanoj. Tiom okulfrapa estas la oferemo de nekristanoj eĉ ateistoj por la pli bona pli bela, estonto de la homaro, ke ofte la kristanoj

devus preni lecionojn de ili. Ĉar, kiel ni jam diris, nur ĉi tiu amo de Kristo povas esti la “komuna denominatoro,” kiu estas viva kaj efika super ĉiuj baroj.

Ĉi tie ni devas menciigi, ke eĉ en la proksima estinteco tiu ĉi kunlaborado de kristanoj – surbaze de ilia kristana konvinko kaj kredo – rikoltis en multaj tielnomataj kristanaj rondoj miskomprenon, suspekton eĉ akuzadon. Nur tiam tiuj kristanoj opiniis ĉi t.n. *kunlaboradon* pardonebla, se malantaŭe kaŝiĝis la sekreta celo; per la humila, tolerema laboro servi *misian celon*, aŭ reakiri la perditan reputacion, estimon aŭ influon de la kristanoj en la nekristana socio. Kompreneble el la graco de Dio povas okazi tiaj mirakloj, dum nia obeema servado, sed se tio estas *la bazmotivo*; denove ni fuŝos la dian ordon, kie la bazo de la amo al la proksimulo ĉiam estas *nur la dankemo* al Jesuo Kristo, nia Savanto.

“Ni devas konfesi kun pento, ke la nekristanoj je multaj okazoj antaŭas nin sur la terenoj de bonfarado, malegoistaj agoj, helpo por la tuta homaro.”

Ĉi tiu amo ne estas teologia tezo, tia origino kaj fonto estas la personeco de Kristo mem, “*kiu alpreninte la formon de sklavo*”, ĉi tiun ekzistad-formon postlasis kiel ekzemplon al siaj dis-

ĉiploj. Nur ĉi tio estas inda al la nomo de Kristo, ĉu temas pri eklezioj, ĉu pri unuopaj kristanoj.

Pri ĉi tiu ekzistad-formo instruas nin la novtestamenta esprimo “diakonio”. Se ni aŭdas ĉi tiun vorton, aperas antaŭ niaj okuloj institutoj de eklezioj, kie oni prizorgas maljunulojn, kriplulojn, orfojn. Ni pensas pri malavaraj bonfaradoj de eklezioj aŭ opaj kristanoj al la mizeruloj ekster la bariloj de la eklezioj.

Ĉu vi scias, kio estas la originala senco de ĉi tiu vorto? Dia-konis, aŭ dia-konia signifas *tra la polvo* – pli klare: tra la polvo de la strato. Kiam la sklavo tenis la bridon de la kamelo sur kies dorso sidis la mastro, kaj la sklavo kondukis la beston tiel, ke dume li iris en la polvo de la strato. – Poste ĝi signifis ankaŭ aliajn domajn servojn kiel substantivo ”servo-pretecon”, sed ni reiru nun iom al ĉi tiu originala senco.

Dum longaj jarcentoj ĉi tiu diakonio – la *agema amo* – tiel aperis en la eklezioj, ke la riĉa eklezio “sidis en la selo” kaj de supre ĝi disdonadis siajn donacojn, helpojn, bonfaraĵojn al la mizeruloj, al la malriĉaj eksteruloj.

Nun la situacio jam parte, kaj kelkloke renversiĝis. Bedaŭrinde la eklezio ne de si mem “descendis de la selo”. Ofte nia Sinjoro devis pere de la cirkonstancoj devigi kaj la ekleziojn, kaj la unuopajn kristanojn por ĉi tiu “descendo”. Kaj tiel fine la eklezioj kaj la opaj kristanoj povas okupi tian postenon, kian nia Sinjoro havis, kaj kian Li postlasis al ni.

Pli frue la riĉa eklezio “servis” al la malriĉuloj – nun la vivnivelo de la ekstera mondo ĉiam pli altiĝas, kaj pro

tio ni devas ĝoji – kaj nun la malriĉa eklezio servas al la riĉuloj.

Per kio ni povas servi al la ekstera mondo?

Pozemo estus nun komenci denombradi servojn, kiel apartenantajn al kristanoj. Pli serioze estas, se ni klopodas enprofundiĝi en la penson, ke la vojo de la kristanoj en la kunvojaĝo kun nekristanoj estas: *La vojo de la servistoj*. Ĉiam tion alporti, kio ĝuste mankas al la mondo: pacemon, trankvilecon, oferon, eble gajecon, komprenemon, aŭ materian aŭ spiritan helpon, – ĉiam tion, kio mankas. Sed neniam ni rajtas forgesi, ke la baza situacio estas, ke ni staras “en la polvo de la strato”!

Alia eco de ĉi tiu vojo estas, ke ĝi estas mallarĝa, t.e. malkomforta. Povas esti, ke al la samaj noblaj celoj – al la paco, justeco, por la suprenlevado de milionoj, vivantaj ankoraŭ en mizero – kondukas ankaŭ pli larĝaj vojoj, kaj multaj iradas ankaŭ sur tiuj vojoj, sed nia Sinjoro serĉas nin sur ĉi tiu speciala, mallarĝa vojo, kie ni sekvas la postsignojn de Jesuo Kristo.

La kunvojaĝantoj

Antaŭ ol paroli pri niaj kunvojaĝantoj mi volas emfazi ankoraŭ tion, ke la kristana vivo estas *vojo, ne tendumejo*. Tiuj kristanoj, kiuj komforte volas establiĝi en sia vivo, subite rimarkos, ke ili restis solaj, ili perdis la postsignojn de Jesuo Kristo, ĉar Li konstante iras antaŭen. La atesto de la anĝelo apud Lia malplena tombo sonas por eterne: “*Li iras antaŭ vi en Galileon.*” Li neniam haltas, ne restas for de la plej aktualaj problemoj de la historio, aŭ de nia

ĉiutaga vivo – Li iras antaŭen, kaj se ni tendumiĝas ie kaj volas konservi ion el la hieraŭa kristanismo; ni iĝos ĉiam pli malproksime de Li.

Kiuj estas niaj kunvojaĝantoj el inter la nekristanoj? Ĉu ili estas la tielnomataj nekredantoj. Jes, ili ne kredas je Dio, sed ili kredas je noblaj celoj, je pli bona estonto, je suprenlevado de mizeruloj, je la progreso de la homaro.

Kompreneble ankaŭ inter la nekristanoj troviĝas homoj, kiuj ne penadas al noblaj celoj, kiuj okupas sin nur pri siaj propraj interesoj, propra progreso. Tiuj, – simile al la egoistaj religiaj homoj, kiuj okupas sin nur pri siaj propraj spiritaĵoj, – restadas “survoje”, kaj ĉiam pli perdas la kontakton kun la vera, antaŭeniranta vivo.

“Firme ni kredas, ke ni estas ligitaj al nia Sinjoro, sed Li ne estas ligita al ni. ..., kaj Lia Spirito influas ĉian bonan agadon sur la tero. ”

Sed en ambaŭ grupoj troviĝas tiaj homoj, kiuj – kvankam sur diversaj etikaj bazoj – tamen batalas, penadas por la samaj celoj. Tiuj estas niaj “kunvojaĝantoj”, kaj ankaŭ ni la iliaj. Eĉ, se ni imagas la komunan celon – de Dio donitan – kiel centran punkton, al kiu el diversaj direktoj proksimiĝas grupoj da homoj, ni povas kompreni, ke ju pli proksime ni estas al la celo, despli

proksime ni devas esti ankaŭ unu al la alia.

Firme ni kredas, ke ni estas ligitaj al nia Sinjoro, sed Li ne estas ligita al ni. Li havas multe pli grandan armeon, ol nur la kristanojn, kaj Lia Spirito influas ĉian bonan agadon sur la tero. Ĉio, kion ni, kristanoj faras el nia dankesprimado, ekkoninte Lian amon al ni, – estas nur malgranda parto de ĉiu bonfarado en la mondo, kiu Lin respiegulas.

Nur enprofundiĝante en tiuj ĉi pensoj ni povas vidi la unuecon de la homaro laŭ la volo de nia Sinjoro, “*Ĉar ne estas personfavorado de Dio*” (Rom: 2,11) kaj “*Li ne privilegias personojn, sed en ĉiu nacio tiu, kiu timas Lin kaj agas juste estas akceptata de Li.*”

Komentoj postprelegaj

Ĉe la alparoloj rimarkinda estis tiu de frato Burkhardt: Ĉu sendepende de la eksteraj cirkonstancoj evoluis ĉi tiu interesa teologia koncepto pri la vojo de la eklezio en la polvo, kiu tre kaptis lin, aŭ nur post la ŝanĝitaj cirkonstancoj ni klarigas tiel nian vojon?

En la respondo mi parolis pri tio, ke kvankam nia Sinjoro per multaj signoj avertis la eklezion jam antaŭ la dua mondmilito kaj montris tion, sur kies flanko estus la loko de la eklezio, ĝi tamen ne komprenis la signojn, kiel ni legas pri tio en la 32-a psalmo: “*Kun konsiloj Mi direktos sur vin Mian okulon. Ne estu kiel ĉevalo, kiel senprudenta mulo, al kiuj oni devas kateni la buŝon per brido.*” Kaj la eklezioj, ne nur la nia, sed ĉiuj, ne defendis la mizerulojn kontraŭ la riĉuloj. Nian

landon, kun sia dekmiliona loĝantaro oni nomis tiutempe la lando de naŭmiliono da almozuloj. Niaj samlandanoj en grandaj amasoj elmigris el la lando ĉar ili ne havis sufiĉe da pano en ĉi tiu riĉa, benita lando, kaj la eklezioj silentis. Kaj tiam nia Sinjoro per la cirkonstancoj devigis la ekleziojn “descendi el la selo”. Tio estas honto por ni, sed nun ni minimume komprenis, ke ne homoj agis kontraŭ ni, sed la Sinjoro agis per pli forta maniero sed ankoraŭ nun el graco. Kaj ni povas atesti antaŭ vi, okcidentaj kristanoj, ke estu prudentaj, ĝis vi havas tempon!

La alia alparolo estis tiu de frato de Boer. Mi bedaŭrinde ne tute memoras pri ĝi, certe temis pri la oferemo de la kristanoj en ia rilato, sed pli bone mi memoras pri mia respondo.

Iom akre mi diris tion, ke oni nomas la ateistojn materialistoj, kaj vidu, ofte ni spertas ĉe niaj okcidentaj kristanaj gefratoj, kiom materialistaj ili estas.

Tuj, kiam ili aŭdas pri *helpo*, ili pensas *nur* pri mono, nutraĵo aŭ vestaĵo,

kvankam ankaŭ en mia prelego mi emfazis jam tion, ke la mondo ĉiam malpli ofte atendas jam tian helpon, kaj ni orientlandaj kristanoj eĉ malpli multe atendas tiajn helpojn. Ni atendas amikecon, komprenemon, la fidon; ke eĉ se ni pensas ne tute same kelkfoje, ni tamen estas kristanoj, kaj ĉi tiun nian malsaman opinion ni ricevis de nia komuna Sinjoro. Kaj mi atentigis pri tio, kiom pli facile oni donas ĝenerale dudek forintojn, ol dudek minutojn al iu por amika interparolado en ĉi tiu rapidritma vivo. La homo ĉiam donis pli facile monon, ol sin mem, tial laŭdas apostolo Paŭlo la kristanojn, kiuj antaŭ la mondonacoj “unue sin dediĉis al la Sinjoro”. Tiajn kristanojn atendas, eĉ sopiras la mondo, kiuj sin mem dediĉis al la Sinjoro, kaj kune kun Li iras “en la polvo”, kantante, gaje disradiante la kontentecon, trankvilecon kaj la pacementon ĉirkaŭ si.



MISTERO

*Nia tero
laŭ la biblio
dekomence estis bona.
Sed pro la misfaroj de la homoj
ĝi fariĝis MISTERO.*

Albrecht KRONENBERGER

La ekumena semajno de preĝo

La *semajno de preĝo* por kristana unueco estas la plej granda monda ekumena demonstracio kiu okazas samtempe en proksimume 75 landoj. Ĝi okazas ĉiun jaron inter la 18:a kaj la 25:a de januaro.

La semajno de preĝo por kristana unueco ĉi-jare (2017), kiu havis la temon de *Repaciĝo – la amo de Kristo* lasas al ni neniun elekton kaj ĝin karakterizas la memoro de reformacio. La materialo estis evoluigita fare de germana grupo.

La ekumena diservo estis grava elemento en la semajno. La materialo havis du fokusajn punktojn. Parte temis pri montri la saviĝon per fido, kio karakterizis la ekleziojn kiuj elkreskis el la reformacio. Parte la materialo volis agnoski la doloron, kiu sekvis la pro-

fundan fendon inter la eklezioj, klare vidi la konfliktojn, kaj proponi diversajn paŝojn al la repaciĝo.

La laboro por kristana unueco estis pacienca laboro, kiu ofte renkontis reziston. Antaŭ la kresko de la ekumena movado, jam dum la mezo de la 19a jarcento oni preparolis en Svedio komunan preĝon por unueco inter kristanoj. En 1908 sugestis la anglikana pastoro Paul Wattson en Usono, ke oni ĉiu-jare inter la 18a-25a de januaro kolektiĝu por preĝo por kristana unueco. En 1966 la semajno de preĝo iĝis komuna projekto de la Romkatolika eklezio kaj la Monda konsilio de eklezioj. Depost 1975 la materialo estas produktita de lokaj ekumenaj grupoj el diversaj mondopartoj.

☞

La suba tabelo estas ĉerpita el al februara novaĵletero Nova Urbo de la Fokolar-movado.

Sur monda skalo, pli kaj pli urĝas dialogo inter la plej grandaj religioj, al kiuj apartenas plimulto de la homaro:

Religio	Nombro de kredantoj	Elcento
Kristanismo	2.3 miliardoj	32 %
Islamo	1.5 mld	22 %
Hinduismo	1 mld	14 %
Tradiciaj religioj de Ĉinio	ĉ. 400 milionoj	5.50%
Budhismo	400 mlnj	5.30%
Etnaj religioj*	300 mlnj	4.20%
Afrikaj tradiciaj religioj	100 mlnj	1.40%
Ceteraj religioj		ĉ. 2.00 %
Entute, de la globa loĝantaro		= ĉ. 84 %

* Rilate al etnaj religioj, ni povas paroli pri: amerikaj indianoj kaj eskimoj (de Nordameriko), aborigenoj en Aŭstralio, maorioj de Novzelando, indiĝenaj loĝantoj sur insuloj de Pacifika Oceano ktp. Por sekurigi pacan vivon en la futuro, oni devas ankaŭ eniri dialogon kun homoj nereligiaj, agnostikoj kaj ateistoj kiuj nombras pli ol unu miliardo (ĉ. 16%) kaj entute sumiĝas al 97 elcentoj de la homaro. Kunlaboro kun tiuj homoj povas okazi surbaze de kulturo, sporto ktp.

*

Fronte al pistolo de registara mortiganto

Traduko de Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

Ĉi tiu artikolo estas traduko de artikolo de Virginia Prodan, kiu aperis en la revuo Christianity Today (Kristanismo hodiaŭ), la eldono de oktobro 2016. La artikolo estas publikigata kun la afabla permeso de Christianity Today.

Malsato de vero kaj libereco

Kiel la plimulto da homoj, mi naskiĝis kun malsato de vero kaj libereco. Bedaŭrinde mi naskiĝis en la komunista Rumanio sub la kruela totalisma reĝimo de Nicolae Ceausescu. Rumanio de Ceausescu estis lando de mensogoj, kie nur esprimo de dubo pri ordono de la registaro povus havi rezulton de enkarcerigo, fizika torturo, – kaj okaze – morto.

Kompreneble, ni ekzistis meze de konstanta maltrankvilo kaj malfido. Iu homo povus kaprice denunci najbaron, lernklasanon, aŭ anon de la familio pro fari deklaron kontraŭ la registaro. La registaro eĉ metis spionojn en la preĝejanaroj. La plej bona maniero de eviti problemojn estis resti silenta, ne fari neniun demandon, kaj peni kaŝiĝi inter la homoj.

Dum multaj jaroj, mi observis miajn gepatrojn kaj parencojn ludi la rolon de 'bona civitanoj' dum ke ili sekrete flustris sian malestimon de la registaro. Mi scivolis: *Kial la homoj ĉiam flustras? Kial ili tre timas diri la veron?*

Ju pli la timo batadis la homojn ĉirkaŭ mi por ke ili silentu, des pli mi

obsediĝis por trovi la veron. Post la licenciĝo, mi eniris en la universitaton de juro kaj mi iĝis advokato. Sed mia laboro – asignita de la registaro – konsistis malmulte pli ol aprobi novajn komunistajn regulojn kaj reglementojn. Tio demoralizis min.

Unu vesperon kliento venis por diskuti leĝpaperon pri kvitigeo de bieno. Ni estis renkontiĝintaj dum monatoj kaj, verdire, mi estis ellaciĝita. Sed ĉi tiu kliento ŝajnis neniam malkuraĝiĝi. Li ĉiam ridetis, kaj li montris sensaĵon de kontento malsimilan al ĉio, kion mi neniam estis observinta. Estis kvazaŭ li estis iel senscianta pri ĉiu mizero kiu ĉirkaŭis lin. Li radiis ĝojon kaj pacon, kaj por iu kialo, tio ĉagrenis min.

Senpense, mi konfesis, “Mi dezirus havi tion, kion vi havas en via vivo. Mi volus havi vian sensaĵon de paco kaj feliĉeco.”

“Ĉu vi ĉeestas la diservojn de la preĝejo? Li demandis.

“Jes,” mi respondis. “Je Kristnasko kaj Pasko. Kial?”

“Ĉu vi volus akompani min al mia preĝejanaro ĉi tiun dimanĉon?”

Mia unua inklino estis rifuzi. Nu, la

komunista registaro fifamis esti tre kontraŭ la Eklezio. Sub la regado de Ceausescu, la kristanoj ofte estis arestitaj, batitaj, kaj enkarcerigitaj. Preĝejoj estis detruitaj, iliaj bienoj konfiskitaj por provizi spacojn por palacoj de Ceausescu. Homo kiu demandis pri la kontraŭ-Dio pozicio de la tirano aŭ estis enkarcerigita aŭ 'malaperis'. Mi sciis ke eble ĉi tio estus artifiko por provi mian fidelecon. Mi mallonge paŭzis por pensi. Tiam mi vidis tiun mienon de paco kaj kontento. Mi deziris tion – tiom ke mi decidis ke tio valoras la riskon.

La proksiman dimanĉon mi vizitis lian preĝejanaron. Tuj kiam la ĥoro finis la unuan kanton, la pastro legis Johano 14,6: “*Mi estas la vojo kaj la vero kaj la vivo; neniu venas al la Patro krom per Mi*”. Mi ne povis kredi tion, kion mi aŭdis. Iu homo pretendis esti la vero?

Dum la pastro daŭrigis prezenti la veron de Jesuo Kristo, mi sentis kvazaŭ la versikloj, kiujn li disdividis estis skribitaj speciale por mi. Vidante trans la trairejon, mi observis mian klienton. Li ridetis, kapsignis, frapetis sian Bibliion kvazaŭ diri, “Ĉu vi nun komprenas?”

Mi komprenis. Senkonscience mi radiadis reciproke al li. Je la unua fojo en mia vivo, ĉio havis signifon. Mi pasigis jarojn serĉante la veron, sed mi estis serĉinta en malĝustaj lokoj – la jura universitato, la registaro, la leĝsistemo. Subite mi komprenis ke la vero estas io, kiu ne devenas el leĝlibroj, sed el Dio mem: la Kreinto de la universo – mia Kreinto, fonto de ĉia vivo, paco, kaj feliĉeco.

Apenaŭ ne reteninte mian ekscitiĝon, mi akceptis la inviton de la pastro por

fidi je Kristo kiel Sinjoro kaj Savanto. Ekde tiu momento, mi dediĉas mian vivon por sekvi kaj diri la veron, ne gravas la kosto.

Mia plej granda provo

Mallonge post ke mi estis baptita, mi komencis defendi kristanajn fratojn kiuj alfrontis enkarcerigon pro transporti Bibliojn trans la landlimon de Rumanio, pro disdividi sian fidon, aŭ pro adori private en siaj propraj hejmoj. Tio rapide faris min celtabulo. Multajn tagojn mi vekiĝis kaj trovis miajn pneŭmatikojn tranĉitajn. Klientoj kaj geamikoj – eĉ miaj filinoj – estis minacataj. Miaj filinoj kaj mi estis detenitaj sub aresto en la domo dum preskaŭ monato. Mi estis forkaptita, minacita, puŝita fronte de trafiko moviĝanta, kaj batita de la sekreta polico. Por ŝirmi sin, geamikoj kaj kunlaboristoj komencis distanciĝi for de mi. Tage mia fido estis provita. Tamen, la plej granda provo atendis min.

Malfrue unu nokton, post longa tago en la tribunalo, Miruna, mia jura helpanto, ekrigardis tra mia pordejo: “Granda viro en la atendejo diras ke li deziras diskuti proceson.” Ŝi ŝultrotiris. “Tio estas ĉio kion li volas diri al mi.”

Mi tre surpriziĝis pro lia grandeco. Kiam li sidiĝis fronte de mia skribotablo, ŝajnis ke liaj okuloj boris truon tra min, kaj rikano aperis ĉe lia buŝo. Malrapide, li retiris sian palton kaj etendis la manon por retiri pafilon el ŝultra pistolinga. “Vi rifuzis atentí la avertojn kiujn vi ricevis,” li diris, celante al mi. “Mi venis ĉi tien por fini la aferon por ĉiam.” Li fleksis la

fingrojn kaj mi aŭdis klaketon.

“Mi estas ĉi tie por mortigi vin.”

Miaj manoj skuiĝis. Mi pensis – ĉu mi rezistu, ĉu mi forkuru? Mia mentono tremis. Bildo ekpasis tra mian menson: mia helpanto alvenonte matene kaj trovonte mian senvivan korpon sur la planko de la oficejo.

Mi estis sola kun mia mortiganto, sed ne tute sola. Mi komencis preĝi silente, fervore, rememorante la promesojn de Dio. Lia Spirito spiris pacon en mian panikitan koron. Tiam mi sensis Lian mesaĝon: Disdividu la Evangelion!

Mi alrigardis la viron antaŭ mi. Malantaŭ tiuj okuloj plenigitaj de malamo estis kreitaĵo de Dio. Li posedis senmortan animon, kaj li bezonis scii pri la amo, kiun Dio estas montrinta en Jesuo Kristo. Tuj kuraĝiĝita, mi rigardis la okulojn de mia mortiganto. “Ĉu vi iam demandis vin: 'Kial mi ekzistas?' aŭ 'Kial mi estas ĉi tie?' aŭ 'Kiu estas la signifo de mia vivo?' Mi iam demandis min tiujn demandojn.” Mia voĉo restis kvieta kaj ĝi ne ŝanceliĝis.

Li glitigis la pafilon en la pistolingon. Mi kliniĝis antaŭen. “Vi estas ĉi tie ĉar Dio metis vin ĉi tien, kaj Li submetas vin al provo. Ĉu vi restos en Dio aŭ en la volo de viro – via estro, prezidento Ceausescu, kiu postulas ke vi adoru lin. Dio donas liberan volon al vi por elekti.” Liaj okuloj moliĝis. Mia koro brubatis pli rapide kaj mia konfido leviĝis.

“La vero estas ke ni ĉiuj koruptiĝis kaj ni foriris de Dio.” Li kapjesis. “Ni ĉiuj estas pekuloj, kaj nia peko determinas nian estontecon. En Hebreoj 9, 27 estas skribite: *'Kaj kiel estas dekretite por homoj unufoje morti, kaj post tio*

juĝo.'” Lia buŝo iomete malfermis kaj liaj manoj malstreĉiĝis.

“Sed la bonaj novaĵoj estas ke Dio preparis eliron por ni ĉiuj per la oferdone de Jesuo Kristo sur la kruco: *‘Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidas al Li, ne pereu, sed havu eternan vivon.’*” (Johano 3,16)

Dum mi daŭrigis paroli, li ŝajnis esti pli malgranda kaj pli paca. Fine li metis sian manon al la frunto kaj li diris, “Vi pravas. La homoj kiuj sendis min ĉi tien estas frenezaj. Mi certe bezonas Kriston.” Li promesis, “Mi iros al via preĝejanaro kiel sekreta frato en Kristo. Mi adoras vian potencon Dion.”

Tiam mia mortiganto foriris, savita – frato en Kristo. Li registriĝis en seminario, kaj ni eĉ daŭrigas la kontakton. Li, kiel mi, trovis la Veron. Kaj nek mi nek li neniam timos diri ĝin plu.

* * * * *



Virginia Prodan estas internacia advokato por la rajtoj de la homoj kaj ankaŭ aliancita advokato kun *Alliance Defending Freedom (Alianco Defendante Liberecon)*. Ŝi verkis la libron, *Saving My Assassin (Savante Mian Mortiganton)*.

œ

Protestantismoj

Unua parto de prelegserio — La Biblio kaj la Fido

Philippe COUSSON, FR

La aŭtoritato de la Biblio kaj la savo nur per fido, restas du el la bazaj ŝtonoj de protestantismo.

La Biblio

Tiun ĉi jaron multaj konsideras kiel la datrevenon de la Refomacio. Se oni volas nepre fiksi daton, tiu ĉi validas, ne malpli ol aliaj. Ni do konservu ĝin. Tamen, mi volas iri iomete antaŭ tiu ĉi dato.

Oni prave konsideras ke la ĉefa elemento de la Reformacio estas la rekta aliro al kaj la diskonigo de la Biblio. Mi do prezentos al vi kelkajn personojn kiuj estis gravaj tiurilate ĉar ili estas tiuj, kiuj eklumigis la Eklezion.

Mia unua estis anglo, naskita en Yorkshire, fariĝis studento kaj profesoro en universitato, pastro, eĉ diplomato. Lia nomo estis John Wycliffe (ĉirkaŭ 1320–1384). Dum siaj studoj li alvenis al kelkaj konkludoj, kiuj ne plaĉis al la tiama eklezio: la religia nevalideco de la sep sakramentoj, la transsubstanciĝo aŭ la religia efiko de la indulgencoj. Por li (1378) la Biblio estas la sola aŭtoritato pri fido antaŭ la skriboj de la Ekleziaj Patroj aŭ la decidoj de la Eklezio. Oni lanĉis kontraŭ li proceson pro herezo, sed la afero fiaskis pro la konfuzo de la granda skismo. Aliaj bataloj liaj estis ke ĉia aŭtorito baziĝas sur la graco, ke la

sekularaj instancoj rajtas kontroli la klerikaron, ke forpreni la posedaĵojn de la klerikaro povas forpreni de ili la senmoralecon (kvankam li mem profitis el la sistemo). Nobeluloj protektis lin kaj li ne estis fronte atakata. Li verkis en la angla lingvo kaj instigis al publikigo de traduko de la Biblio en la anglan.

Tiu unua kompleta angla traduko aperis post lia morto (en 1382 Nova Testamento, en 1384 Malnova Testamento). Liaj verkoj estis kondamnitaj sed li mem devis nur retiriĝi en sian paroĥon, kie li poste mortis.

Liajn posteulojn oni moke nomis *Lollards*, (eble babilemaj) kaj oni rapide persekutis. Oni riproĉis al Wycliffe ribelon (1377–1381), en kiu li tamen ne partoprenis.

Studentoj de Bohemujo venis por studi en Anglion, kaj tie renkontiĝis kun la verkoj kaj ideoj de Wycliffe.

En la Koncilio de Konstanco (1415) Wycliffe estis kondamnita kaj oni eltombigis lian kadavron kaj forĵetis ĝin.

Mi ĵus menciis la bohemajn studentojn. Tiel mi alvenas al mia dua persono. Li estis ĉeĥo. Li estis Jan Hus (ĉirkaŭ 1370–1415), kvankam infano de kamparana familio li povis tamen studi kaj

fariĝis magistro kaj pastro. Dum sia studado li konatiĝis kun la verkoj de Wycliffe pro tiuj kiuj revenis el Anglio. Li ankaŭ havis kontaktojn kun pli fruaj praprotestantoj, valdanoj kiuj troviĝis en Bohemujo de multaj jaroj. Li predikis ĉeĥe, eĉ estris la universitaton, tradukis la Novan Testamenton. Laŭ li, herezo estas difinita nur rilate al la Sankta Skribo. Al tiu teologia batalo aldoniĝis lingva batalo en la universitato. Kvankam subtenata de la nobelaro kaj de la popolo li devis ekziliĝi en la kamparon.

La Eklezio kunvokis lin en Konstancon en la koncilion. Kvankam oni donis al li garantion, li estis arestita kaj bruligita sur ŝtiparo. Pri li Luther diris *“Oni povis bruligi Huson, sed oni ne povis bruligi la veron”*.

El liaj ideoj disvolviĝis reformaj movadoj en Bohemujo, unu militista kun Žižka, unu kiu trovis interkonsenton, la utrakvistoj, kaj ankaŭ unu pacema kiu poste fariĝis la Morava Frataro, pri kiu mi pli poste parolos.

Ekzistas bildoj, kiuj prezentas jene Wycliffe-on kiel la fajrilon, Huson kiel la meĉon kaj Luteron kiel la torĉon.

La unua kiu tradukis la Bibliion en la anglan rekte el la originaj lingvoj (ne el la latina Vulgato) estas William Tyndale (1494–1536). Li estis influita de la *Lollards*. Post teologiaj studoj, kiuj ne kontentigis lin ĉar oni rifuzis ke la homoj legu la Skribon, li forlasis Anglion kaj iris en la Sanktan Imperion por studi la hebrean lingvon. Influita de Luther kaj Erasmo, li ektradukis la Bibliion en la anglan. Tiun laboron kompletigis Miles Coverdale (1488–1569) en 1535. Tiu traduko profitis reklamon de la episkopo

de Londono kiu publike bruligis la unuan eldonon. Multaj poste volis havi ĝin. Tyndale estis arestita en nuna Belgio kaj strangolita. Lia traduko forte influis la version de la reĝo Jakobo (King James Version).

Interese ankaŭ estas rigardi pli malantaŭen en la 12an jarcenton. Bankisto en Liono, nomata Pierre Valdes (aŭ Vaudes aŭ Valdo) (ĉirkaŭ 1140–1206 aŭ 1217). Li konvertiĝis inter la jaroj 1170–1173, tradukigis la Novan testamenton, vendis siajn posedaĵojn kaj fariĝis predikisto. Aliaj kiel li iris duope por prediki kaj komenti la Skribon. Li serĉis agnoskon de la Eklezio, kiun li ne ricevis kaj eĉ estis kondamnita. Li fuĝis al Bohemujo, kie li mortis.

Oni atribuas al li la grupojn de kredantoj nomataj Valdanoj, kiuj post persekutadoj kaj migradoj, restis ĝis nun en Italio kie ili konsistigas la ĉefan protestantan eklezion.

En 1532 ili aliĝis al la Reformacio post kontaktoj kun Guillaume Farel en la sinodo de Chanforan (1532). Ili subvenciis la tradukon de la Skriboj en la francan de Olivetan.

Kiel vi povas supozi pro mia elekto, la ĉefa afero por protestantoj estas la legado, studado, meditado de la Sanktaj Skriboj, sekve ankaŭ iliaj tradukoj kaj disdonoj.

Rilate al tio mi volas rakonti epizodon de la vivo de juna knabino kimra, Mary Jones (1784–1864). El malriĉa familio metiista de kalvinana metodista kredo, ŝi ĉeestis de sia infanaĝo la Diservon kaj deziris legi la Bibliion aŭdatan ĉiudimanĉe. Tuj kiam venis instruisto

en la vilaĝo ŝi komencis lerni legi. Kiam ŝi ekscipovis legi la pastoro eĉ petis ŝin legi el la preĝeja Biblio. Poste, ŝi eksciis ke en apuda urbo estas viro kiu vendas kimralingvajn Bibliojn. Ŝi volas havi unu. Dum 6 jarojn ŝi laboris por la najbaroj krom ŝia laboro hejme kaj ŝia lernado ĝis ŝi ŝparis sufiĉe da mono. Ŝi do paŝadis en la montetaro dum tuta tago nudpiede al tiu urbo kiun ŝi atingis vespere. Bedaŭrinde, ĉiuj kimralingvaj Biblioj estis venditaj. Tamen post du tagoj venos aliaj. Ŝi do estis gastigata en la urbo ĝis ŝi povis akiri sian Biblion tiel atendatan. Ŝi eĉ eble ricevis du. Kiam ŝi revenis al sia vilaĝo okazis festo. Aŭdinte pri tiu historio, pluraj homoj, krom la vendisto ankaŭ i.a. la politikisto kristana William Wilberforce, tiu kiu batalis kontraŭ sklaveco, starigis la unuan grandan Biblian Societon, la Britan kaj Alilandan Biblian Societon, kies celo estas traduki kaj disvastigi la Sanktajn Skribojn. Multaj aliaj sekvis en multaj aliaj landoj. Tiu societo estas unu el la eldonintoj de la unua kompleta Biblio en Esperanto en 1926.

Tiu laboro de la Bibliaj Societoj havis kiel konsekvencon la evoluon de lingvistiko kaj tradukarto, kun homoj kiel Cameron Townsend (1896–1982) kaj Eugene Nida (1914–2011).

—

Tiu intereso al la sanktaj tekstoj havis kiel rezulton la evoluon de la rigardo ĝuste al la tekstoj mem. La teksta kritiko volas starigi la ĝustan tekston, el la diversaj konataj manuskriptoj. En tio gravis krom la humanisto Erasmo (1467–1536) kiu kompilis la “*Textus receptus*” Johan Albrecht Bengel (1687–1752),

Griesbach (1745–1811) kaj Eberhard Nestle, kies versio post modifo konata kiel “*Nestle-Aland*” estas nun la plej uzata teksto de la greka Nova Testamento.

Plia kritiko estas la kritiko de fontoj, kiu serĉas de kie venas tiu teksto aŭ tiu peco de teksto kaj konstruas hipotezojn, ekzemple per kritiko de la formoj.

Reage al tiuj esploroj estas kristanoj kiuj rifuzas ke oni dubu pri la teksto iamaniere. Tion oni nomas *senerarismo* kaj tion difinis la deklaro de Chicago (1978).

En protestantismo, la plej supra aŭtoritato estas dekomence la Skriboj, kaj la sekvo de ĝia historio estas kiel kompreni ĉi tion, kaj kiel vivi el ili, kiel paroli pri ilia enhavo.

La fido

La rememorata homo ĉijare estas Martin Luther (1483–1546). Filo de kampara patro kun investoj en kupro-minejoj, li ricevis striktan edukon. Kiel pluraj aliaj gravaj reformaciuloj li estis instruita en lernejo de la Fratoj de la Komuna Vivo (*Devotio Moderna, La imitado de Jesuo Kristo*, movado akceptita en Konstanco 1415). Post filozofio li studis juron, sed post sperto de timo dum ŝtormo, li fariĝis monaĥo aŭgustena. Li studis teologion, diplomiĝis kaj post trastudado de la epistolo al la Romanoj komprenis ke la justeco laŭ Dio estas tiu, kiu venas el la fido.

En 1517, alia monaĥo trairis la tiaman Germanion por kolekti monon por la konstruado de la Baziliko Sankta Petro en Romo, kun la promeso ke tiu mona helpo al la Eklezio helpos ankaŭ la savon

de la donacanto aŭ de tiu alia familiano. Tio estas la indulgencoj. Martin rifuzis tion kaj proteste publikigis siajn 95 tezojn, laŭdire afiŝante ilin sur la pordo de kapelo en Wittenberg. Tiu dato (1517) estas la dato retenita por komenciĝo de la Reformacio, kvankam tute teorie. Ne nur kontraŭ la indulgencoj li protestis, sed kontraŭ aliaj dogmoj, kio kondukis la Roman Eklezion al kondamno kaj ekskomuniko de Luther. Lia ĉefa argumentado estas: “Mi ne ŝanĝos mian sintenon ĝis vi pruvos al mi per la Skriboj ke mi malpravas”. Kun la helpo de pluraj, i.a. Melanchton, li starigis dogman kaj praktikan bazon por renovigo de la Eklezio. Inter la gravaj tekstoj por liaj posteuloj estas la Konfeso de Augsburg (1530) kiu kun posta teksto, la Libro de Konkordo (1580) konsistigas la bazon de la Luteranaj Eklezioj.

Grava periodo en la historio de la Luteranaj eklezioj estas la periodo de pietismo, kiu aperis en la 17a jarcento

reage al dogmismo senviva. Ĝiaj radikoj venas el disĉiplo de Melanchton, Johann Arndt (1555–1621) kies verkon *La vera kristanismo* reeldonis Philipp Jacob Spener (1635–1705) kun enkonduko kiu fariĝis la fondoteksto de pietismo, la *Pia desideria*, eldonita sola poste.

Gravaj pietistoj estis la muzikisto Haendel (1685–1759), la teologo Bengel kiu enkondukis pietismon en Würtemberg.


Mi krome simple mencias du gravajn personojn en la historio de luteranismo: la dana teologo kaj filozofo Søren Kierkegaard (1813–1855) kaj la teologo kaj pastoro germana Dietrich Bonhoeffer (1906–1945).

La aŭtoritato de la Biblio kaj la savo nur per fido restas du el la bazaj ŝtonoj de protestantismo. En postaj tekstoj, mi prezentos al vi kelkajn aliajn temojn gravajn en protestantismo ligitaj kun personoj kaj movadoj.



Reaperis finfine mia studaĵo pri Teologio de Religioj

Gerrit Berveling
Van Vredenburgweg 435
2284 TA Rijswijk
Nederlando
+70-213 4914



Prediko dum Bibliaj tagoj

– en la urba preĝejo de Wittenberg la 5an de februaro 2017

Wolfram ROHLOFF, DE

Graco estu kun vi kaj paco de Dio, nia patro, kaj de nia sinjoro Jesuo!

26 Ĉar vi ĉiuj per la fido estas filoj de Dio en Kristo Jesuo. 27 Ĉar ĉiuj el vi, kiuj al Kristo baptiĝis, surmetis al si Kriston. 28 Ne estas ja Judo nek Greko, ne estas sklavo nek liberulo, ne estas ja vira kaj virina; ĉar vi ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo. 29 Se do vi apartenas al Kristo, vere vi estas la idaro de Abraham, kaj heredantoj laŭ la promeso.

Galatoj 3, 26 – 29

Karaj gefratoj, hodiaŭ mi volas mediti kun Vi pri la bapto. Kian utilon havas la bapto por ni?

Ĉar en Germanio multaj opinias, ke la bapto ne havas utilon.

Kelkaj argumentas: “Kian utilon la bapto havu? Normale temas ja pri beboj: La pastoro trifoje verŝas akvon sur la kapon, la familianoj staras ravite apude, oni kantas komune – komuna kantado hodiaŭ ja estas eksterordinara. Sed kian utilon havu la bebo, se pastoro publike lavas ĝian kapon?! Do: Nur estas familia festo!”

Mi mem ankaŭ tre ŝatas familiajn festojn, sed *bapto* estas io tute alia.

Por aliaj, pli piaj personoj bapto nur estas videbla konfeso aŭ persona decido por la kristana kredo. Por tiuj personoj bapto de bebo ne havas utilon, ĉar bebo ja ne mem povas decidi.

Do: Kion utilas la bapto? Nenion aŭ ĉion? Por Paŭlo almenaŭ la bapto estas

decida: *Ĉar ĉiuj el vi, kiuj al Kristo baptiĝis, surmetis al si Kriston.* (3,27)

Laŭvorte li eĉ skribas: “en KristoN baptiĝis“. Tiuj vortoj montras, kio esence estas bapto: La bapto transportas nin en Kriston; aŭ alivorte: per la bapto ni estas en la sfero de Kristo; per la bapto ni apartenas al li aŭ pli ekzakte: estas en li. Do bapto estas multe pli ol homa konfeso!

Oni diras, ke la bapto estas sakramento. Per la vorto sakramento oni esprimas, ke Dio mem agas. Normale ja pastoro baptas. Sed esence la plej malgrava persono dum bapto estas la pastoro: Jes ja, la pastoro prenas akvon, donacas la bapton, benas, preĝas ktp., sed ne la pastoro gravas por la bapto, sed Dio! Nur Dio mem povas meti personon en la sferon de Kristo!

Tial la Biblio ankaŭ parolas pri la bapto kiel pri nova naskiĝo. En tiu senco la pastoro estas plejbonkaze nur la

akuŝisto, aŭ pli ekzakte nur rigardanto, sed nek la novnaskita infano, nek patro, nek patrino.

Ĉu eblas vidi, ke Dio agis dum la bapto? Jes: *Ĉar ĉiuj el vi, kiuj al Kristo baptiĝis, surmetis al si Kriston.*

Ni surmetis Kriston. Kristo estas nun kvazaŭ mia vesto. Pro la vesto Vi ekkonas personon, ĉu estas policisto, konduktoro, soldato, kuracisto, bakisto, ... pastoro ? Germane ni diras: Vestajoj transformas personon.

Vi do surmetis Kriston! Kiel do videblas, ke Vi estas kristano? Mi nun volas paroli pli konkrete: *Ne estas ja Judo nek Greko, ne estas sklavo nek liberulo, ne estas ja vira kaj virina; ĉar vi ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo.* (3,28)

Kio inter ni gravas? Ĉu la nacio? Ĉu mi estas germano, siriano aŭ make-dono? Ĉu mi estas vira aŭ ina? Kio gravas inter ni?

Tiuj diferencoj ne plu gravas, asertas Paŭlo.

Mi dubas! Ĉar tiuj diferencoj – nacio, socia stato, sekso, ili ja estas esencaj por ni ĉiuj, kaj ni ne povas fuĝi el ili!

Ne estas ja Judo nek Greko ...

Eĉ se mi ne havus ŝtatanecon, tio havus sekvojn por mi.

... ne estas sklavo nek liberulo ...

Estas granda diferenco, ĉu mi estas ekonomie memstara aŭ dependa aŭ eĉ sklavo!

... ne estas ja vira kaj virina ...

Eĉ se iu bedaŭrus sian sekson, tamen la sekso kaj la sociaj normoj grave influas lin aŭ ŝin!

Kaj tamen Paŭlo pravas: *Ne estas ja Judo nek Greko, ne estas sklavo nek liberulo, ne estas ja vira kaj virina; ĉar*

vi ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo.

En la centro de nia kredo estas liberigo, la liberiga certeco, ke Dio ne juĝas min laŭ normoj, kiuj dominas ĉie en tiu ĉi mondo. Dio ne juĝos min laŭ miaj malfortoj aŭ fortoj, laŭ la sociaj aŭ biologiaj devoj, el kiuj mi ja ne povas fuĝi! Nia fido al Dio liberigas nin de devoj kaj timoj, kiuj malliberigas nin. Tial Paŭlo ĉiam denove skribas vortojn kiel la sekva: *Por libereco Kristo nin liberigis* (Gal 5,1).

Sed jen venas limigo, ĉar Paŭlo aldonas: *Ne estas ja Judo nek Greko, ne estas sklavo nek liberulo, ne estas ja vira kaj virina; ĉar vi ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo.*

Tiu fundamenta egaleco kaj libereco en nia mondo nur ekzistas “en Kristo”.

En nia mondo ekzistas limoj: limoj inter landoj, homoj, seksoj, sociaj tavoloj, mondkonceptaj, ideologiaj, religiaj, politikaj ... limoj.

Per kelkaj bonaj vortoj, eĉ per Via bona volo Vi ne povos forigi tiujn limojn! Estas fundamentaj limoj inter homoj kaj popoloj. Kaj tiuj limoj ne estas renversitaj en nia mondo, sed nur “en Kristo”!

Ĉu mi ne per tio neas ĉion, kiun mi ĵus diris pri la egaleco kaj libereco, kiujn donacas Dio al tiuj, kiuj al li fidas?

Ne! Tiu “en Kristo” ne estas fikcio, sed de Dio donacita realo. Ke “en Kristo” ne plu ekzistas limoj, tio dum la pasintaj jarcentoj ŝanĝis unue la malgrandajn kristanajn grupojn kaj poste nian mondon.

Kaj kiel? En la tempo de Paŭlo plenis da sklavoj. Multaj kristanoj tiutempe ne estis liberuloj sed sklavoj aŭ ekssklavoj,

kiuj estis dependaj de siaj eksposedantoj. Mondo sen sklavoĵo tute ne imageblis!

Iam sklavo kun la nomo Onesimo fuĝis de sia sinjoro Filemon, kiu estis kristano. Hazarde Onesimo renkontis Paŭlon kaj iĝis kristano. Kaj nun? Kion faru Paŭlo kun tiu fuĝanta sklavo?

Ke sklaveco tute ne ekzistu, tion ni lernas el la Biblio. Sed la malmultaj kristanoj en la tempo de Paŭlo ja ne havis eblecon malenkonduki sklavan sistemon, kiu ja eĉ hodiaŭ en aliaj formoj postvivas! Homoj kiel Spartako sen-sukcese provis tion!

Kion do Paŭlo faru? Ĉu kaŝi Onesimon? Ĉu sendi lin al fora lando? Ne: Paŭlo resendas lin al lia sinjoro kaj posedanto, Filemon, kaj donas al li leteron por Filemon.

Kion li skribas? Li skribas: Kara Filemon, nun ne plu gravas, kio estis Onesimo por Vi, do Via sklavo. Nun li estas Via frato en Kristo! Traktu lin tiel! Kaj ne forgesu, ke ankaŭ Vi havas sinjoron, Jesuon Kriston!

Paŭlo ne povas malenkonduki sklavan sistemon, sed li povas rememorigi kristanajn sklavposedantojn kiel Filemon, ke “*en Kristo*” ne plu estas sklavo nek liberulo.

Ni hodiaŭ havas aliajn, gravajn problemojn en nia mondo. Sed ankaŭ ni ne povas ŝanĝi la mondon tutan. Kristo ankaŭ ne ordonas, ke ni forigu la limojn en la mondo, sed kial ne forigi kelkajn limojn en nia persona vivo?

Vi certe jam aŭdis pri la milito en Sirio kaj la multaj fuĝantoj. Fini tiun katastrofon ni ĉi tie ne povos. Sed helpi al homoj en Sirio aŭ al fuĝintoj en Germanio, tion ni certe povas.

Ĉu kelkfoje Vi ĝemas pro la jugo de Via geedzeco? Sed kial ne tamen de tempo al tempo montri al via edzo aŭ edzino, ke li estas la persono, kun kiu Vi volas vivi ĝis Via morto?

Ĉu al Vi posedas firmaon? Tiam honeste traktu Viajn dungitojn, kiuj vivas per Via mono.

Ĉu Vi estas dungito? Montru do al Via estro respekton ankaŭ tiam, kiam Vi opinias, ke Vi pli bone gvidus la entreprenon – la sama ankaŭ validas por niaj politikistoj.

Ĉu Vi bonŝancas vivi sekure en Germanio aŭ Eŭropo? Tiam ne parolu pri fremduloj kvazaŭ ili estus fibestoj.

Ĉu Vi havas najbarojn, kiuj ne salutas? Kial ne tamen saluti ankaŭ tiujn, kiuj ne kapablas resaluti?

Multajn ekzemplojn mi povus aldoni, sed ne necesas. La mondon ni ne povos savi, sed trakti aliajn tiel, kiel ĝi kongruas kun nia vivo “*en Kristo*”, tion ni ja povas!

Ĉar ĉiuj el vi, kiuj al Kristo baptiĝis, surmetis al si Kriston. Ne estas ja Judo nek Greko, ne estas sklavo nek liberulo, ne estas ja vira kaj virina; ĉar vi ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo.

Kian utilon do havas la bapto? Grandan, tre grandan eĉ: Bapto liberigas nin, liberigas nin de la timo, ke ni ne valoras multon, ĉar per la bapto Vi estas en Kristo baptita, estas infano de Dio.

Nun ni ne plu estas sklavoĵo de la ofte senditaj leĝoj kaj devoj de nia mondo, sed povas libere vivi kaj agi “*en Kristo Jesuo*”, nia sinjoro.

Al Dio estu dank’! Amen.



Dum ne estas malfrue...!

Julia SIGMOND, IT/RO

Kaj alvenos tiu momento, kiam jam estos malfrue! Dum nia juneco ni eĉ ne pensas pri ĝi! Nur mezaĝe ni komencas interesiĝi kaj demandi niajn gepatrojn kaj niajn geavojn pri la pasinteco, pri iliaj infanaĝaj memoraĵoj, pri la travivitaj okazaĵoj. Poste, maljuniĝinte, konsterniĝinte ni konstatas: jam estas malfrue! Jam ne vivas tiu, kiun ni povus pridemandi! Kvankam treege ni dezirus koni, scii, ekzemple la jun-aĝajn memoraĵojn de niaj gepatroj, la ĝojojn kaj la ĉagrenojn, la neplenumiĝantajn sopirojn aŭ eĉ la neripareblajn preterlasojn.

Nur ili povus rakonti pri ni! Kiaj ni estis? Ni bone scias, ke ĉiuj homoj estas aliaj. Ekzistas aĝaj personoj, kiuj eĉ nepetite volonte rakontas. Eble ili sentas la alproksimiĝon de la fino, kaj neniel ili volas porti en la tombon la belajn memoraĵojn.

Sed ekzistas ankaŭ enfermiĝemaj homoj, kiuj internen vivas kaj memoras, la tiel nomataj introvertitoj, kiuj eĉ post longaj petadoj, tre malfacile inklinas paroli pri la pasinteco.

Kvankam estus pri kio rakonti! Ja ĉies vivo estas aparta romano. Ofte estas malfacile aŭ peze por la junularo aŭskulti la tro longajn rakontojn de la maljunuloj. Ili ne scias, ke ĉi tiuj “rakontoj” gvidas al duobla celo.

La unua: tute certe, ĉi tiuj rakontoj estas fakte moralinstruoj por ĉiuj aŭskultantoj! Eĉ se ili ne povas akcepti

nun la nepetitajn konsilojn, sed eble post iom da tempo ili iĝos pensigaj!

La dua: estas granda helpo por la gemaljunuloj esti aŭskultataj, ĉar la rakontado vekas en ilia animo la memoraĵojn kaj ekpensante pri ilia beleco, la tago aŭ eĉ la tuta semajno iĝos sunbrila!

Antaŭ nelonge bona amiko sendis al mi la sekvontajn liniojn dediĉitajn al ĉiuj patrinaj de la mondo. Ili estas vere pripensindaj. Mi aldonas nur mian proponon: ni demandu niajn oldulojn, dum ne estas malfrue!

Kaj nun legu atente ĉi “statistikon”!

Kion ni kredas, ke patrino scias?

Je la 4. jaraĝo: Patrino ĉion scias.

Je la 8. j: Patrino scias multe.

Je la 12. j: Patrino ne scias ĉion.

Je la 14. j: Patrino preskaŭ nenion scias.

Je la 16. j: Mia patrino? Kion ŝi scias?

Je la 18. j: Ĉi maljunulino vivis kiel infano dum la erao de dino-saŭroj

Je la 25. j: Eble patrino scias ion pri ĉi tio...

Je la 35. j: Antaŭ la decido, mi volas preparoli kun la patrino.

Je la 45. j: Certe, la patrino povas orientigi min.

Je la 55. j: Kion farus patrino en ĉi tiu kazo?

Je la 65. j: Se mi povus preparoli kun la patrino pri ĉi tiu afero...

☪

La Biblio sur via tabulkomputilo, poŝtelefono aŭ komputilo – en Esperanto kaj pli ol 1000 aliaj lingvoj

Jerald VEIT, US

Programo *YouVersion*

Jam ekzistas konfuziga multeco de paĝoj kun kristanaj enhavoj sur la interreto, kaj la kristana disvastigo jam delonge efike uzas la ilojn de la mondvasta komunikado por sia misio. Oni povas do demandi sin, ĉu vere necesas unu plia artikolo pri tiaj programoj kaj rimedoj.

Tamen dum eksterlanda misia vojaĝo al Francio kun mia edzino mi eksciis pri tre impona Biblia programo por saĝ-telefona uzo. Laborante kun evangelikala kongregacio en Verdun, necesis al nia malgranda laborgrupo de francaj, germanaj kaj usonaj kristanoj rapide kaj malmultekoste trovi Biblion en la afrika lingvo lingala, parolata en la Respubliko de Kongo. Unu membro de nia grupo, inĝeniero de Kalifornio, kunportis kun si sur sia poŝtelefono la programon **YouVersion**. Per malmultaj klakoj, aŭ pli precize, per malmultaj premoj de la daŭmoj, li facile kaj senkoste trovis la tutan Biblion en lingala. Tion ni povis uzi en multlingva Diservo, kiun ni preparis por la venonta Pentekosta dimanĉo.

Reveninte al Usono, mi dum du jaroj preskaŭ forgesis pri tiu eta mirindaĵo. Sed mi denove eltrovis ĝin, kiam mi serĉadis novajn metodojn por uzi

Esperanton sur la reto, specifice en kristana senco.

La hejmpaĝo de *YouVersion* (www.youversion.com/www.bible.com) frape anoncas ke “la Biblio estas ĉie” kaj klarigas, ke la programo enhavas 1477 versiojn de la Biblio en 1072 lingvoj, kun pli ol 259 milionoj da instaloj. Granda plimulto de tiuj lingvoj estas parolataj kaj legataj en la evoluantaj landoj de Afriko kaj Azio. Mi tre ĝojiĝis eltrovi, ke en tiu listo oni ne forgesis inkluzivi Esperanton.

Por multaj lingvoj, eblas kaj legi kaj samtempe aŭskulti, granda avantaĝo por lernantoj de fremdaj lingvoj aŭ por nacilingvanoj, kiuj lernas legi la propran lingvon. Bedaŭrinde ne troviĝas aŭdia versio en Esperanto kaj mi demandas min, kial ankoraŭ ne ekzistas aŭdebla versio de la Biblio en Esperanto post pli ol jarcento de ĝia internacia ekzisto?

Oni povas ankaŭ legi du lingvojn flanke en paralelaj kolumnoj sur la ekrano – utila ilo por lernantoj de Esperanto aŭ de naciaj lingvoj, ĉar oni povas legi Esperanton kune kun sia nacia lingvo aŭ kun iu alia fremda lingvo.

Kaj ĉio – ja ĉio – estas senpage! Oni povas sin registri kaj krei propran “konton”, sed tio ĉefe nur necesas se

oni volas, ke la programo memoru elektitajn de vi tekstojn aŭ viajn personajn notojn, meti libromarkilojn aŭ kundividi apartajn versiklojn kun amikoj, ekzemple per Facebook. Ĉiam eblas legi la Bibliion libere sen registrado. Ankaŭ eblas elŝuti *apon* (aplikaĵoj) por uzo kun tabletoj kaj poŝtelefonoj, sed mi mem ne uzis ĝin por mia tableto kaj mi ne trovis iun malavantaĝon pro tio.

Kaj kvankam la programo estas kreitaĵo de la usona *Life Church* en Oklahomo, la uzant-interfaco estas ne nur en la angla, sed en 45 aliaj lingvoj. Estas facile elekti sian preferatan lingvon je la subo de la enira paĝo. Per tio la programo fariĝas facile uzebla por internacia legantaro. Eblas elekti Esperanton por la Bibliaj legaĵoj kaj vian nacian (aŭ alian) lingvon por la diversaj aliaj tekstoj.

Parto de la programo konsistas el aro de legplanoj kun mallongaj gvidaj tekstoj por legi sinsekvon de versikloj el la Biblio laŭ diversaj temoj; ekzemple pri zorgemo, suferado, amo kaj gedziĝo, fido, espero, pardono kaj aliaj. Tamen mi mem trovis tiun aspekton iomete malforta kompare al la partoj kun la nekomentitaj Bibliaj tekstoj. La gvidaj tekstoj ŝajnis esti verkitaj plejparte por gejunuloj – ne malbona afero en si mem – sed mi trovis ilin iom tro supraĵaj por mia gusto. Kaj ili ne haveblas en Esperanto.

Laŭ mia opinio la programo enhavas kelkajn aliajn relative malgravajn ĝenaĵojn. Ekzemple oni povas elekti sian preferatan unuan lingvon (Esperanton, ni diru) por legi la Bibliion, sed se vi poste elektas iun duan lingvon por kompara legado, tiu dua lingvo malaperas tuj, kiam oni foriras de la paĝo aŭ fermas la programon, kaj oni devas ĉiufoje elekti ĝin denove. Mi trovis, ke oni devas iomete “ludi” kun la programo por pli bone ekkoni ĝiajn diversajn facetojn. Tamen, entute la programo ne estas tro komplika kaj kun iom da pacienco flanke de la uzanto ne prezentiĝas grandaj problemoj.

Vizitu www.YouVersion.com aŭ (pli bone) iru rekte al www.bible.com. Aldonante la mallongigon por via nacia lingvo, (de, fr, es, sv, ru, cs, hu, ktp.) eblas rekte atingi nacilingvan enirpaĝon (ekzemple www.bible.com/de por la germana).

Iru rekte al la Biblio en Esperanto (ĉi-kaze kun franclingva interfaco) per: <https://www.bible.com/fr/bible/841/jn.1.esp>



67-a kongreso de KELI

7. – 14. aŭgusto 2017, Z Ö B L I T Z, Germanio

Temo: Fruktoj de la Reformacio

*Se Vi planas partopreni la KELI kongreson
ne forgesu rapide aliĝi !!!!*

La nuna listo de partoprenontoj de la kongreso en Zöblitz:

1. KRONENBERGER Albrecht	Germanio	12. KRÜGER Siegfried	Germanio
2. STAMM Sieglinde	Aŭstrio	13. OJASILD Endel	Estonio
3. ÅRADSSON André	Svedio	14. OJASILD Joonatan	Estonio
4. ÅRADSSON Bengt Olof	Svedio	15. GAILLARD Samuel	Francio
5. RÁCZKEVY-EÖTVÖS Ágnes	Hungario	16. SCHAEFFER Karl Heinz	Germanio
6. POLNICKÝ Pavel	Ĉeĥio	17. SCHAEFFER Hedwig	Germanio
7. CHRDL Petr	Ĉeĥio	18. BIRTA Sabolciu	Rumanio
8. FISCHER O. Arnošt	Ĉeĥio	19. ROHLOFF Wolfram	Germanio
9. STIER Gabriella	Rumanio	20. COUSSON Philippe	Francio
10. POSPÍŠIL Václav	Ĉeĥio	21. LEUZE Ernst	Germanio
11. SÜDLAND Norbert	Germanio	22. KOZ Christa	Germanio

Kongresa programero — ekskurso al Dresdno

Kutime dum niaj kongresoj ni faras ekskurson – ĉi-foje al Dresdno kun sia kultura historio. Jam en 1206 la urbo estas menciita kaj iĝis ankaŭ reĝa rezidejo. Dresdno estas konata pro inter alie sia malnova centro, Frauenkirche kaj Semperoper. Pro sia milda klimato kaj la situo sur ambaŭ flankoj de Elbo, ĝi kelkfoje estas nomata “Elbflorenz” [Florenco ĉe Elbo]

Ankaŭ en la historio de Esperanto, Dresdno ludis rolon, ekz. en 1908 okazis la 4-a Universala kongreso kun ĉirkaŭ 1400 kongresanoj. De post 2001 troviĝas Esperanto-biblioteko en Dresdno.



informejoj

Ret-informilo de la eldonejo KAVA-PECH

Mia eldonejo KAVA-PECH funkciigis novan version de la paĝaro kun la sama retadreso kiun havis la antaŭa; rekte al la libroj en Esperanto gvidas jena ligilo: www.kava-pech.cz/esperanto

Tie ankaŭ eblas mendi neregulajn retajn informilojn. Mi neniukaze volas iun ajn ĝeni per la nedezirataj varbmaterioj, sed jes informi la interesiĝantojn. Sciu, ke la Ret-informiloj neniam enhavos aldoniĝojn kaj ili estos dissenditaj laŭokaze, neniam pli baldaŭ ol unu monaton post la antaŭa.

Jen la lastaj novaĵoj de KAVA-PECH en Esperanto:

- **La Vojo al Harmonio** J. A. Komenius - L. L. Zamenhof

Eseo pri la vivoj, verkoj kaj misioj de Komenio kaj Zamenhof

- **Home en senhomeco – Militaj impresoj**

Fare de la konata aŭstra esperantisto Martin Stuppnig estas memuar, en kiu la aŭtoro priskribas siajn memoraĵojn el la milito, kiam li estis devigita batali por la venko de la Tria Imperio

- **Spirita revolucio en la koro de Eŭropo**




La libro estas verkita en la formo de galerio de elstaraj personoj en la ĉeĥa historio kaj ĝi prezentas fundamentojn de la ĉeĥa spirita tradicio - la tradicio de humanismaj idealoj.

- **Heredantoj de silentado**

Fare de Sabine Dittrich estas romano, kies fabulo respegulas la komplikajn rilatojn inter germanoj kaj ĉeĥoj en la tempo post la 2a mondmilito.

Granda peto al vi: Se vi, krozante tra la nova retejo de KAVA-PECH trovos ajnan eraron, misfunkcion aŭ nekutimaĵon, mi tre petas vin sendi al mi la informon prian, ke ni povu ĝin ripari. Antaŭdankon.

Amike vin salutas Petro Chrdle, posedanto de la eldonejo KAVA-PECH.



Veninta estas nun la fin'

NUN IST DAS JAHR ZU END GEBRACHT – JAHRESWECHSEL



1. Ve - nin - ta es - tas nun la fin'
kun ĝo - jo kaj su - fer' por ni



de l' jar'; ĝi prok - si - mi - gis nin
al la e - ter - no i - om pli.



Dum ĉi - u tag', en ĉi - u hor'



ŝir - ma - dis nin ——— la Di - fa - vor'.

2. La jar' forpasas en kviet',
la nova venas kun sekret'.
Ne scias la estonton ni,
sed paŝtas nin la bona Di'.
La jaron enpaŝante, Vin,
Sinjor', ni petas: Benu ĝin!

NUN IST DAS JAHR ZU END GEBRACHT (JAHRESWECHSEL) • M (Ach bleib bei uns = Calvisius): ĉe Seth Calvisius 1594, ĉe Bartholomäus Gesius 1601 «Uns ist ein Kindlein heut geboren» • ADORU 254 • germana T: nekonata verkinto, el: «Kirche und Leben» 1986 • E: Manfred Retzlaff, decembro 1986; prilaboro, ĉefe aldono de linioj 5 kaj 6 en la unua strofo kaj elekto de la melodio: Albrecht Kronenberger 2016-12-24